Ĉi tiu numero eliras al ĉiuj E.-grupoj en la mondo!

Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 5. de l' monato.

Leteradreso: Wien, I., Neue Burg, Telefono R-27-803

Manuskriptoj nur resendotaj kontraŭ reafranko.

Aŭstria Esperantisto

Jarabono komencebla ĉiumonate por Aŭstria ŝ 4.60, pagebla ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj svfr. 4.25 (9 poŝtrespondkuponoj) Ponumere 45 g (1 prk).

Poŝtŝparkaso-konto aŭstria D 123.826.

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 10 (147) Korneuburg ĉe Wien, la 5. oktobro 1937. 14. jaro

Diskutoj pri la IEL-UEA-problemo en Varsovio dum la Universala Kongreso de Esperanto aŭgusto 1937.

Montriĝis jam en la komenco, ke estas forta deziro inter la esperantistoj pri solvo de tiu problemo. En la unua kunsido de IEL-Komitato estas aranĝite, ke 3 personoj, la prezidanto kaj s-roj Hetzel kaj Bugge-Paulsen renkontu la reprezentantojn de UEA, por prezenti al ili la jenan rezolucion kaj donis ĝin je 19 h de 8. aŭgusto al la **Provizora Komitato** de UEA:

Varsovio, 8. aŭg. 1937.

Aŭdinte la raporton de la prezidanto pri UEA kaj IEL, la Komitato unuanime opinias, ke unueco estas tre dezirinda por la bono de la movado. Sed ĝi konstatas, ke IEL de preskaŭ unu jaro montris plenan vivecon, diskonigis siajn celojn kaj la nombron de siaj membroj. Ĝi atendas, ke UEA siaflanke konigu:

1. la nombron de siaj membroj,
2. kion ekzakte reprezentas la personoj, kiuj de 8 monatoj estas nomataj „Provizora Komitato“, kaj kio estas ilia laŭstatuta pozicio,
3. siajn celojn, kiujn ne klare montras la ĝis nun publikigitaj artikoloj;
4. siajn precizajn proponojn.

IEL estas preta pritrakti tiujn proponojn kun plena bonvolo. Subskribis: L. Bastien, R. Rugge-Paulsen, J. Couteaux, H. W. Hetzel, B. E. Long, E. Malmgren, P. H. Mooij, A. C. Oliver, H. Steiner.

Je la 21 h IEL-Komitato ricevis jenan respondon:

Varsovio, 8. aŭg. 1937.

Al sinjoro **Louis Bastien**, prezidanto de IEL, Varsovio.

Tre estimata sinjoro,

Konforme al la ĝenerala deziro de la esperantistoj, ke regu konkordo, ni proponis al vi sinjoro Generalo kunvenon por trovi la bazon de tia konkordo. Hieraŭ vi akceptis tiun ĉi iniciaton, sed hodiaŭ vi transdonas al ni demandaron skribe respondotan.

Via nuna paŝo certe ne helpas al la efektivigo de la deziro esperantista, tiom klare montrita dum la Malferma Kunveno. Ni havas la netan impreson, ke vi intencas eviti **ĉian** diskuton. Tamen pro la bono de la afero ni respondas al vi, kvankam ne estas dignoplena procedo, tuŝi situacion, kiu estis kreita de vi mem. Ni informas vin do:

Punkto 1: La Centra Kaso de UEA notis ĝis fino de julio 1937 — 1200 anojn.

P. 2: La jura situacio de la Prov. Komitato de UEA estas al vi bone konata. Vi transdonis la ŝlosilojn de la oficejo al la protestintoj, rekonis do ilian faktan rajton kaj povon agi laŭ la cirkonstancoj. Vi bone scias, ke la Prov. Komitato laboras laŭ art. 14 de la Svisa Kodo. Cetere ĝi estas rekonita kiel agadrajta de la leĝaj povoj en Genève.

P. 3: La celo de UEA estas konata. Ĝi troviĝas en la statuto de 1934, kiu validas.

P. 4: Vi deziras koni niajn proponojn. Ni deziras unue, ke regu klara situacio inter ni ambaŭ kaj ke oni lasu al UEA liberecon de agado. El tiuj du premisoj, necesaj kondiĉoj por konkordo, ĉio alia facile solviĝos, se ekzistas la sama bona volo je via flanko.

Respondinte viajn demandojn ni niavice demandas vin, sekvante vian procedon. Tiel ni ne alvenos je fino. Nome ni deziras scili ĝis morgaŭ tagmeze (9. aŭg. 37) 12-a horo:

1. Kiam vi intencas repagi al UEA la sumojn deprenitajn, kiuj servis por fondi vian Ligon?
2. Ĉu kaj kiam 3 reprezentantoj de via Komitato estas pretaj kunsidi kun 3 reprezentantoj de UEA kaj unu plia persono ekster ambaŭ organizaĵoj por trovi eblecon efektivigi la deziron esprimitan de la esperantistoj?
3. Vi konas la situacion de UEA. Ni nun deziras scii la staton de via Ligo, precize el kiuj rimedoj vi povis egaligi la gravan diferencon inter normala nombro de anoj (stato de UEA en 1936) kaj la nuna nombro de **pagintaj** anoj de via Ligo, notinde malpli alta ol UEA kalkulis pasintjare.

Univ. Esperanto-Asocio, Provizora Komitato.

(Subskribis): K. M. Lininger, prezidanto; H. Kürsteiner, komitatano.

La sekvantan tagon, la 9. aŭg., Komitato de IEL denove kunsidis kaj pretigis jenan respondon, senditan al la reprezentantoj de UEA, 16 h:

Varsovio, 9. aŭg. 1937.

Estimataj samideanoj,

Ni ricevis vian leteron de la 8-a kaj dankas vin pro la tuja respondo al niaj demandoj. Ni ne nun detale komentas pri ili sed devas atentigi vin, ke nia tria demando rilatis ne al la celoj de UEA, sed la celoj de ĝia provizora komitato pri solvo de la nuna organiza problemo.

Responde al viaj demandoj:

1. Ni ne uzis eĉ 1 centimon de UEA-mono por starigi IEL. La mono, apartenanta al UEA, estis en aparta bankkonto. Ni jam informis vin pri la sumo je via kredito, kiun ni estas pretaj repagi al vi. — La aliajn sumojn, kiujn vi postulis, ni ne povas rekoni, ĉar ili estas jam uzitaj sole por la bono de UEA mem kaj por ĝia administrado.
2. Ni estas pretaj akcepti vian proponon, ke 3 reprezentantoj de IEL kunsidu kun 3 reprezentantoj de UEA kaj 1 plia „neŭtrala“ persono. Por tiu ni proponas d-ron Adam Zamenhof.
3. Ĉi kune detaloj pri nia membraro en julio 1931. La nombro en la nuna momento estas pli ol 10.000 kaj ankoraŭ restas 5 monatoj ĝis la fino de nia jaro ,kiam la nombro certe kreskos je kelkaj pliaj miloj eĉ laŭ la cirkonstancoj. El tiu klare vid-

---

La kontraŭuloj asertas,

ke Esperanto estas lingvo komunista. Tiun opinion supozeble kaŭzas la ekzisto de atentinda t. n. proleta E.-movado apud la neŭtrala. Kompreneble Esp. estas nek speciale komunista, nek speciale socialista, nek speciale demokrata, nek entute politika. Sed ĝi estas lingvo utiligebla al ĉiu kaj al ĉio. Ankaŭ la t. n. „interna ideo“ ne estas partie-politika sed ĝenerale-homa. Por eviti la supre cizitan malveran aserton, estas necese, ke la neŭtrala Esp.-movado ne ankaŭ tendencu unuflanke en iu politika direkto, sed restu neŭtrala efektive.

igas, ke IEL jam estas akceptita de la esperantistaro kaj havas firman bazon.

Vi rimarkos laŭ la respondo al via dua demando, ke ni estas pretaj diskuti kun vi kun plena bonvolo iajn proponojn, kiujn vi submetos por solvo de la nunaj malfacilajoj. Ni jam elektis niajn reprezentantojn. Ni devas atentigi vin al la fakto, ke via respondo estas adresita al s-ro Bastien persone, kvankam la letero estis sendita al vi de nia Komitato. Ni petas, ke estonte vi adresu viajn leterojn al la Komitato de IEL.

La Komitato de IEL: L. Bastien kaj la aliaj (kiel en la antaŭa letero).

IEL-Komitato elektis kiel siajn reprezentantojn sian prezidanton kaj s-rojn Malmgren kaj Goldsmith.

En kunsido de IEL-Komitato la 10. aŭg. je la 10 h matene la prez. raportis, ke d-ro Zamenhof konsentis akcepti la proponitan rolon. En la sama tago je la 12 h IEL ricevis jenan respondon:

Intern. Esperanto-Ligo, Komitata kunveno.
Varsovio.
Warszawa, 10. aŭg. 1937.

Tre estimataj samideanoj, ni dankas vin pro via respondo al nia letero de 9-a kaj ni informas vin:

Pasintaj aferoj: la postuloj de UEA pri mono ne koncernas IEL-on, sed nur la estintan prezidanton de UEA G-lo Bastien, sole respondecan pri la ŝanĝoj en la havaĵo de UEA dum kaj antaŭ la decido de la Tribunalo. Ni ne deziras reveni je aferoj diskutitaj, ne povas rekoni nek akcepti la oferton faritan pri pago de kelkaj miloj da frankoj. Ni do mantenas nian postulon, jure pravigeblan kaj pravigitan.

La du vidpunktoj tiom diferencas, ke interkonsento ne estos ebla. Ni tial estas devigataj transdoni la aferon al plua prilaboro al nia advokato.

Tamen ĉion konsiderante kaj ne dezirante sencele elspezi monon por proceso, ni estas pretaj iri paŝon renkonten. Sed ni tuj precizigu, ke ni neniel akceptas aŭ akceptos proponon tian, kian vi faris.

Ni ripetas, ke pri tio ĉi ni rilatos nur kun Sinjoro Generalo Bastien.

Kunveno: Konsentite. Bonvolu fiksi horon kaj komuniki al ni. Tamen ni deziras, ke partoprenu la kunvenon, kiu estas interkonsiliga, s-ro Isbrucker kiel neŭtrala persono, pro lia kompetenteco en la materio kaj liaj provoj trovi solvon de la problemo.

Pri la proponoj, kiujn ni havas, ni preferas atendi ĝis la kunveno mem. Ne estas al ni, UEA, fari tiajn. Ĝia konstitucio ekzistas, necesas nur regrupigi la perdiĝintajn anojn. Pri tio ni konigas nian opinion dum la kunveno.

Bonvolu akcepti niajn sincerajn salutojn UEA, por Prov. Kom.: Lininger, Kürsteiner.

Respondo de IEL samtage je la 16 h:

UEA, Varsovio. 10. aŭg. 1937.

Tre estimataj samideanoj,

Ni danke ricevis vian respondon al nia letero de 9-a. Ni informas vin, ke ni telefonis al d-ro Adam Zamenhof, Królewska 41, ke nia delegitaro vizitos lin hodiaŭ mardon je la 18 h 30. Tiu delegitaro konsistos el s-roj Bastien, Malgren kaj Goldsmith. Ni petas, ke vi bonvolu elekti 3 personojn por reprezenti UEA en tiu kunveno, tiamaniere, ke ĉeestos la 7 personoj de vi proponitaj. Ni intencas proponi, ke d-ro Zamenhof prezidu la kunvenon.

Ĉar s-ro d-ro Zamenhof estas la neŭtrala persono, kiun ni ambaŭ bezonas, nia Komitato opinias, ke ne estas utile havi alian neŭtralan personon; sed ĝi vidas neniun malhelpon, ke vi elektu s-ron Isbrücker inter la reprezentantoj de UEA.

Kun plej sinceraj salutoj,
La Komitato de IEL (subskribis la samaj personoj).

En la sama kunsido la ĉeestantaj komitatanoj akceptis kaj subskribis la jenan **rezolucion** kaj sendis kopion al la Provizora Komitato de UEA:

„La Komitato de Internacia Esperanto-Ligo, konsistanta el la samaj personoj kiel la antaŭa komitato de Universala Esperanto-Asocio, per ĉi tiu rezolucio atentigas la Provizoran Komitaton de UEA, ke ĉiuj decidoj pri elspezoj, faritaj en 1936 en Ĝenevo kaj Londono, estis faritaj ne de la prezidanto sola, sed de la Komitato tiu Estraro laŭ la kutima maniero."

La aranĝita kunveno okazis en la domo de d-ro Zamenhof la 10-an aŭg. je 18 h 30.

Jen la **protokolo** de la kunveno:

Ĉeestis: d-ro Zamenhof.

Flanke de UEA: Lininger, Kürsteiner, Jakob.
Flanke de IEL: Bastien, Malmgren, Goldsmith.

D-ro Zamenhof faris enkondukan paroladon kaj poste donis la parolon al IEL.

S-ro Bastien: Ni bezonas daŭran solvon. La sperto montras, ke la monrimedoj de la esperantistaro en la nuna momento povas vivigi nur 1 Centran Asocion. Mi estas preta eksiĝi, se tiu eksiĝo povas faciligi la unuecon.

Sro Jakob: Mi tute konsentas pri la financa konstato de sro Bastien. Laŭ la nuna stato UEA povas vivi nur 2 jarojn aŭ eble 1. Ni revenu al la stato antaŭ Helsinki. Ni formu transiran komitaton, kiu trovu rimedon por reveni al tiu stato.

Sro Goldsmith: IEL povas vivi kontentige. Se ni revenus al tiu stato de antaŭ Helsinki, denove estus senĉesaj konfliktoj.

Sro Malmgren: UEA povus fariĝi ia idea unuiĝo, eĉ en la kadro de IEL, kiu estus la internacia organizaĵo.

Sro J.: Tio ne estas solvo.

Sro M.: Ĉu vi tute ne volas ŝanĝi la statuton de UEA por akceli la pacon?

Sro J.: Ne, ĉar ni ne deziras labori kun la 50-centima kotizo kaj ni volas, ke la Aktivaj Membroj elektu la Delegitojn.

Sro B.: La simplaj membroj estas gravaj je morala vidpunkto por la movado. Mi apogas la proponon de sro Malmgren, ĉu UEA ne povas esti idea asocio.

Sro J.: Neeble!

Sro Lininger: Ĉie regas la deziro, ke UEA estu la asocio de individuaj membroj kaj IEL de la Landaj Asocioj. Redonu al ni niajn delegitojn. Ni ne ŝanĝu nian statuton. Plie ne restu en Ĝenevo. Kiam IEL pagos sian ŝuldon al UEA?

D-ro Zamenhof: Tiu demando koncernas teknikan aferon, ne la esencon de la problemo.

Sro M.: UEA varbu kiel ĝi volas, sed ne la membrojn de IEL kaj reciproke. Ni ne devas batali inter ni.

Sro J.: Intenco bona, sed ĝi ne solvas la problemon, ĉar ĉiam estos konkurenco.

Sro Kürsteiner: UEA havas priorecon por la delegitoj. IEL-del. estu nur por propagando.

Dro Zamenhof: Mi konstatas, ke el ambaŭ flankoj oni diras, ke devas esti nur unu organizaĵo kaj ne du. Do, unu organizaĵo laboru en la kadro de la alia. Oni dividu la rolojn. Mi proponas, ke estu nur unu titolo UEA kun du apartaj oficejoj en Ĝenevo kaj Londono.

Sro G.: Mi proponas apartajn kunsidojn por diskutado. (Tion oni faris dum duonhoro.)

Post reveno en la saman ĉambron s-ro Bastien faris jenan proponom nome de IEL-komisiono sub rezervo de aprobo de la Komitato:

a) Estu nur 1 internacia organizaĵo kun nomo UEA aŭ IEL.

b) La centra oficejo estu en Londono, kun filia oficejo en Ĝenevo, kiun estros sro Jakob. Tiu ĉi zorgos ekzemple pri propagando, ŝlosiloj, la biblioteko kaj aliaj taskoj. Sro Malmgren estas preta, por helpi al paciĝo, rezigni la rolon, kiun li jam komencis, zorgante pri la propagandaj aferoj.

c) La nuna provizora komitato de UEA estu reprezentata en Komitato de la nova organizaĵo, por montri, ke estas kunfandiĝo kaj ne ensorbo.

Sro K.: Proponas novan kunsidon de la komisiono kaj intertempe ili konsideros la proponon.

S-ro Bastien dankas al d-ro Zamenhof por lia afableco.

(Subskribita) Adam Zamenhof.

La propono, farita en tiu kunveno al la reprezentantoj de UEA, estas legita al la Komitatanoj de IEL la saman vesperon je la 22 h kaj la Komitato aprobis ĝin.

La 12-an aŭg. je 14 h 10 prez. Bastien ricevis jenan respondon:

Varsovio, 12. aŭg. 1937.

Al IEL.-Kunveno en Varsovio.

Tre estimataj samideanoj,

per tio ĉi ni havas la honoron, submeti al vi proponon de UEA sur la bazo de la propono de d-ro Zamenhof. Ni dankus vin, se vi bonvolus ĝin studi kaj informi nin pri kunveno, dum kiu ni diskutu la tekston. Ni prezentas al vi, tre estimataj samideanoj, niajn korajn salutojn.

La reprezentantoj de UEA:

K. M. Lininger, prez. de Prov. Komitato.
H. Kürsteiner, membro de Prov. Komitato.
Hans Jakob, administranto.

Propono de UEA pri Unuecigo de la Esperanto-Movado.

La ĝenerala deziro de la esperantistoj, kiel montras diversaj publikaj deklaroj de E.-organizaĵoj kaj plej elokvente la elkrio dum la malfermo de la jubilea kongreso, estas **unuecigo** de la tuta movado neŭtrala. Sekvante tiun ĉi deziron (kaj premon) 3 reprezentantoj de UEA kaj 3 de IEL kunsidis en la laborĉambro de la kreinto de Esperanto sub la prezido de ties filo d-ro Adam Zamenhof.

Post elmontro amkaŭflanka de la nuna situacio, 2 organizaĵoj kun sama statuto, estis prezentitaj diversaj ideoj, el kiuj tiu de d-ro Adam Zamenhof estas atentinda plene:

Reiri al la tradicia UEA kun du oficejoj. La reprezentantoj de UEA studintaj ĝin atente, opinias, ke ĝi estas taŭga bazo por forigi la dualismon, tute konservante tipajn trajtojn de la du brancoj.

La aliaj proponoj estis:

1. Reveni al la stato de Helsinki. UEA unuflanke, Ligo de Landaj Asocioj aliflanke. Supera komitato kun reprezenta karaktero.

(Propono de UEA.)

Nia gazeto aperigos glumarkojn en 10 koloroj en la venonta monato.

2. Du organizaĵoj: IEL kiel ĝenerala kun sidejo en Rickmansworth, UEA-sekcio de IEL kun sidejo en Ĝenevo kun aldonoj de diversaj taskoj, ekz. propagando.

(Propono de IEL.)

Tiuj 2 proponoj returnas la radon de la historio. Kaj estas tute certe, ke tion la esperantistoj ne akceptos. Ili ne protestos, ili ne plendos, ili ne kritikos plu, sed ili ne plu aliĝos, kaj deflankiĝos de nia neŭtrala movado, sin turnante al pli interesaj kaj pli laŭtempaj formaĵoj.

Konsciante pri la graveco de la momento la reprezentantoj de UEA studis tre atente ĉiun eblecon, kiu ne tuŝu la sentojn kaj kiu samtempe respondu al la realeco. Principe akceptante la proponon de d-ro Zamenhof ili plilarĝigas ĝin kaj proponas ĝin per la nuna teksto kiel plej taŭgan solvon:

Transiro.

La transiro al la reformita UEA okazu plej malfrue ĝis fino de la jaro. La Centra sidejo en Ĝenevo troviĝos tiam en la estinta Palaco de Ligo de Nacioj, Internacia Labora Oficejo, Ruĝa Kruco ktp. La Palaco Wilson mem gastigas de nun la plimulton de la duonoficialaj kaj privataj organizaĵoj internaciaj.

La taskoj de Centra Oficejo en Ĝenève restas la samaj kiel ĝis nun. La oficejo de Rickmansworth estu filio kun la titolo Oficejo por Sekcio de Eksteraj Aferoj de UEA.

Pri transdono de aktoj kaj materialo kiel pri la plenumotaj taskoj de tiu ĉi sekcio decidos la estonta estraro de UEA.

Krom tiuj laboroj ampleksiĝontaj laŭ la cirkonstancoj, la filio de Rickmansworth servas kiel Teritoria Brita, kolektante la kotizojn de la individuaj membroj en Britujo.

Al paco interesperantista per unueco organiza!

Proponoj Ĝeneralaj.

Universala Esp.-Asocio estas la sola organizaĵo neŭtrala esperantista.

Ĝia jura bazo estas la statuto de 1934, laŭ la Interkonsento de Kolonjo, kun kelkaj ŝanĝoj, laŭ la spertoj faritaj dum la lastaj 2 jaroj. La Centro estas en Ĝenevo, kun filio en Rickmansworth apud Londono.

Strukturo.

La strukturo de UEA estu tia, ke ĝi permesas akcepton de ĉiuj — escepte de organizaĵoj kun nete politika celo —. Por atingi tiun ĉi celon necesas kompletigi la statuton. La ĉefaj kaj plej gravaj ŝanĝoj estas:

1. Landaj asocioj, kiuj aligas siajn membrojn (0.50 centimoj sv.), rajtas nomi komitatanon por 500 ĝis 1000 membroj aligataj.

2. Ĉiuj aktivaj membroj de UEA (ankaŭ tiuj en landoj, kiuj aligas siajn anojn) elektas komitatanojn laŭ internacia kunmetita listo, 300 anoj aktivaj 1 komitatanon.

3. Landaj Asocioj, kiuj ĝis nun ne povis partopreni la internacian organizaĵon pro diversaj kaŭzoj, estas invitataj partopreni en la komitato — kun konsila voĉo. Laŭeble faciligoj pri la pago de la kotizo de 50 centimoj estas antaŭvidataj per nova sistemo kalkula (presigo de dokumentoj, akiro de premioj kontraŭ kotizoj).

Ekzistu nur esperantistoj samrangaj. Ĉiu honorinda persono, ĉiu organizaĵo estu akceptata! El tio rezultas:

1. Ne plu estu punkotizo por personoj, kiuj ne apartenas al enlanda organizaĵo (laŭ Interkonsento de Kolonjo tiaj personoj devis pagi 50% pli, se ili volas aliĝi al UEA).

2. En landoj, kie ekzistas pluraj organizaĵoj kun landa karaktero, estas akceptataj ĉiuj. Devas esti trovota inter tiaj Landaj Asocioj ia interna aranĝo laŭ la devizo: Marŝi disigite, batu kune.

3. Estas principe konsentata loko kun konsila voĉo en la komitato de UEA al la fakaj societoj. La ĝisnunaj statutoj, intence aŭ ne, ne atentis pri la utilo de ĉi tiuj organizaĵoj, laborantaj kun malmultaj rimedoj sen sufiĉa morala apogo de la tuta movado.

Al sama vico apartenas la subteno de la finance malfortaj Landaj Asocioj en oriento kaj sudo de Eŭropo, al kiuj plia atento devos esti donota.

Tiun leteron la Komitato de IEL pritraktis en kunveno, kiu komenciĝis samtage je 14 h 15. Oni tuj pretigis jenan respondon kaj sendis ĝin al la reprezentantoj de UEA je la 16 h kaj aranĝis, ke la Komisiono kunvenu ĉe d-ro Zamenhof je la 18 h 30:

Varsovio, 12. aŭg. 1937.

Al la Provizora Komitato de UEA.

Tre estimataj samideanoj,

Ricevinte vian respondon ni bedaŭre devas konstati, ke vi ne bone komprenis la proponon, kiun ni faris en la kunsido de la 10-a. Tiu propono estis: Vidu la punktojn a), b) kaj c) en la letero de IEL al UEA la 10. aŭg. 1937.

Vi proponas:

a) 1 internacia organizaĵo neŭtrala UEA.

b) La Centro en Ĝenevo kun filio en Londono.

c) La landaj asocioj ne estas membroj de la organizaĵo, sed nur rajtas aligi siajn membrojn.

Nia respondo:

a) Konsentite.

b) IEL estas organizaĵo, kiu post malpli ol 1 jaro nun havas pli ol 10.000 membrojn, el kiuj 2700 estas individuaj membroj. Dume UEA laŭ sia lasta oficiala informo havas nur 1200. Tamen IEL, ne entuziasme, prenis sur sin, konsenti oficejon en Ĝenevo, kiu kostos al ĝi monon, nur por ebligi la pacon kaj kontentigi per tio viajn aspirojn. Sed la Centra Oficejo devas resti en Londono.

c) Neniam plu la landaj asocioj konsentos ne esti esenca parto de la Centra Organizaĵo. Ni do devas manteni la proponojn, kiujn ni faris antaŭ 2 tagoj. Ni atentigas vin, ke por la bono de Esperanto nia Komisiono faris jam en la unua kunveno la maksimumajn cedojn, kiujn ni povas prirespondi antaŭ niaj elektintoj.

Kun samideanaj salutoj

(sekvis la samaj subskriboj: Bastien ktp.).

Je la citita horo la IEL-reprezentantoj estis en la hejmo de d-ro Zamenhof, kiu informis ilin, ke la UEA-reprezentantoj ne povis vidi ian eblecon pri interkonsento kaj pro tio ne volis ĉeesti.

La sekvantan tagon, la 13. aŭg., dum komitatkunsido de IEL, kiu komenciĝis je la 10 h, la prezidanto raportis, ke d-ro Zamenhof petas, ke la membroj de la komisiono



Flexen-ŝoseo

en belega regiono interligas Tirolon kun Vorarlberg.

La klišoj de Bundeskanzleramt (Heimatdienst).

ĉeestu kunsidon kun la UEA-reprezentantoj je la 12.30 por intertrakti la pluan sintenadon ambaŭflanke. La komitato faris por indiki sian sintenadon, jenajn **decidojn:**

1. IEL promesas ne ataki UEA kondiĉe, ke UEA ne ataku IEL.

2. IEL rigardas kiun ajn atakon kontraŭ gvidanto de IEL, ĉu en gazetoj aŭ cirkuleroj aŭ ĉu publike, kiel atakon kontraŭ la Ligo.

3. Kompreneble ambaŭ asocioj havas la rajton informi objektive siajn membrojn pri la okazintaĵoj dum la Varsovia Kongreso.

Protokolo de kunveno dum Varsovia Kongreso je la 13-a aŭg. je la 12 h 30:

Prezidis: **D-ro Zamenhof.**

Ĉeestis: flanke de UEA: Lininger, Kürsteiner, Jakob; flanke de IEL: Bastien, Malmgren, Goldsmith.

S-ro **Goldsmith** legis la protokolon pri la kunsido je la 10. aŭg. kaj post unu du etaj aliigoj ĝi estas interkonsentita por posta subskribo.

D-ro Zamenhof diris, ke li tre bedaŭris, ke kunfandiĝo ne pruviĝis ebla, sed li esperis, ke almenaŭ estu ebleco pri kunagado. Li sugestis, ke oni povus paroli pri jenaj eblecoj:

1. Ĉesigo de polemiko.

2. Organizo de nur 1 internacia kongreso.

3. Pretigo de 1 komuna jarlibro.



Soseo tra Gesäuse
kondukas laŭflue de Enns inter Stirio kaj Supra Aŭstrio.

S-ro Goldsmith legis la decidon de IEL-Komitato kaj s-ro Jakob demandis „Kio estas atako?“

Dro Zamenhof respondis, ke unu asocio ne diru publike, ke la alia malbone agis aŭ agas.

Sro Jakob: La Proviz. Komitato de UEA jam decidis ne plu publikigi ion pri pasintaĵoj, sed li parolis pri la jura respondeco de la prezidanto de IEL. Ambaŭ asocioj opinias, ke publika diskutado pri pasintaj aferoj en formo polemika malutilas al la movado kaj ambaŭ interkonsentas eviti ĉion, kio povas esti konsiderata kiel ofendo al la alia.

La propono estas unuanime akceptita sub rezervo de aprobo flanke de la du komitatoj.

La tria punkto en la rezolucio de la IEL-Komitato estas ambaŭflanke akceptita.

La membroj de la komisiono tiam diskutis pri la ebleco okazigi nur unu internacian kongreson.

Sro **Jakob** proponis, ke ambaŭ organizaĵoj, UEA kaj IEL interkonsentu, ke la jara manifestacio de la esp.-aro estu afero inter ambaŭ.

1. Ĝi konservu la nomon: Universala Kongreso de Esperanto.

2. Pri la licencpago decidos interkonsente ambaŭ organizaĵoj.

3. Ambaŭ organizaĵoj faros sian eblon por ke la Universala Kongreso estu bone vizitata.

4. En la kongres-estraro estu reprezentanto de ambaŭ organizaĵoj.

La reprezentantoj de UEA tiam proponos al Svisa Esp.-Societo, ke ĝi konservu la inviton de Svisa Registaro por 1939. UEA siaflanke subtenos la kongreson en Londono per ĉiuj rimedoj. Pri la kongreso en 1939 estos speciala interkonsento.

La reprezentantoj de IEL: pri tiuj proponoj ni devas interkonsenti kun la komitato.

(Subskribita): **Adam Zamenhof.**

Komitat-Kunsido de IEL, la 13. aŭg., je 14 h 40:

La sekretario de IEL raportis pri la okazintaĵoj dum la kunsido de la komisiono. Post zorga konsidero la komitato unuanime akceptis jenan rezolucion:

„La komitato kun bedaŭro konstatas, ke ĝi ne povas fari aranĝojn pri kunlaborado kun asocio, kiu samtempe minacas ĝian prezidanton per leĝa proceso, sed ĝi denove faras la proponon, pri kiu ĝi decidis en sia kunsido de la 13-aŭg. je la 10-a horo.“

Protokolo de kunsido de la komisiono la 13-an aŭg. je la 19 h:

Prezidis: D-ro Adam Zamenhof.

Ĉeestis: la komisionanoj kiel antaŭe.

Sro Goldsmith legis la lastan decidon de la IEL-Komitato.

Dro Zamenhof esprimis bedaŭron, ke la unuecigo renkontas tiom da malfacilaĵoj, sed tamen konstatas, ke estas interkonsento pri ĉesigo de polemikoj.

Sro **Jakob** diris, ke jes, sed nur post klareco de la pasintaĵoj.

Sro **Lininger** diris, ke temas pri la mono, kiun UEA postulas de sro Bastien.

Dro Zamenhof: Mi estas tute neŭtrala en la afero, sed petas ne tuŝi la pasintaĵojn. Se tiu demando stariĝus, mi devus demeti mian postenon.

Sro **Jakob** demandas, ĉu sro Bastien rilatos nun kun sro Lininger por solvi la postulan demandon kaj sro Bastien respondis, ke neniam li estis ricevinta la precizan ciferon.

Dro Zamenhof rememorigas sian enkondukan paroladon kaj deklaras, ke, se oni daŭros paroli pri tiu punkto, li demetos sian funkcion kaj fermos la kunsidon, ĉar li ne sentas sin kompetenta en komercaj aferoj.

Sro **Jakob** cedis pri la punkto.

Dro Zamenhof demandis, ĉu la interkonsento pri ĉeso de polemiko validas.

Sro **Jakob** respondis, ke en la intereso de la paco ili ne diskutos pri la pasinteco en la ferma kunsido.

Post multa argumentado estas decidite, ke d-ro Zamenhof faru deklaron en la ferma kunsido de la kongreso pri la decido farita.

La ĉeestantoj tiam diskutis pri la ebleco aranĝi nur unu internacian kongreson. Pri tiu punkto s-ro **Jakob postulis** minimume:

1. La kongreso 1938 en Londono kaj tiu de 1939 en Bern.

2. La du kongresoj estu organizitaj de IEL kaj UEA kune.

3. Ke UEA ricevu certan parton de la licencpago kaj li sugestis 2/5.

(Subskribita): **Adam Zamenhof.**

En kunsido de IEL-Komitato, kiu okazis je la 13. aŭg. je la 23 h, estis decidite unuanime, ke IEL aranĝos la kongreson en Londono en 1938 kaj estas preta tion fari en Bern 1939, sed ĝi ne povas akcepti la du aliajn kondiĉojn.

Protokolo de kunsido de la Komisiono je la 14-a aŭg. je la 9 h 15:

Prezidis: D-ro Zamenhof. Ĉeestis: la samaj.

Dro Zamenhof petis, ĉu la UEA-reprezentantoj estas pretaj subskribi la protokolon de la unua kunsido de la Komisiono.

Sro **Jakob** respondis, ke ili ne subskribos ion, sed li aldonis, ke ili ne polemikos en la kongreso kaj en la gazeto. Ili ne plu parolos pri la pasintaĵoj.

Sro **Bastien:** „Resume vi rifuzas subskribi la protokolon?“

Sro **J.:** „Ni ne plu parolu pri tekstoj. Dro Zamenhof povas subskribi la protokolon de la unua kunveno.“

Dro Zamenhof: „Notu, ke la reprezentantoj de UEA konsentas pri la teksto de la protokolo, sed rifuzas subskribi ĝin.“

Sro **Jakob:** „UEA konsentas nenion plu publikigi en polemika formo pri la pasintaĵoj. (Decido de Proviz. Komitato de UEA en majo 1937.) Pro la faritaj spertoj la reprezentantoj de UEA en Varsovio ne deziras subskribi la protokolon, sed konsentas pri ĝia enhavo.“

Sro **Bastien:** „Tio indikas, ke la gvidantoj de UEA kulpigas la gvidantojn de IEL pro spertoj faritaj en 1936—37, sed tio ne estas fakto, ĉar sro Jakob parolis pri la Interkonsento de Kolonjo.“

Dro Zamenhof: „Vi estas prava.“

Sro **Jakob:** „Ni aldonu ‚Pro la faritaj spertoj post la Interkonsento de Kolonjo'. Ĉu vi intencas publikigi tion?“

Dro Zamenhof: „Mi pensas, ke tio necesas.“

Sro **Goldsmith** raportis pri la decido de la IEL-Komitato rilate al la kongresoj.

Sro **Jakob:** „Tio finas la kunvenon, ĉar ni ne plu povas diskuti en tiaj kondiĉoj.“

La reprezentantoj de UEA forlasas la ĉambron.

(Subskribita): **Adam Zamenhof.**

Kvankam estis decidite dum tiuj kunsidoj, kiel ankaŭ dum la kunsido de Internacia Porkongresa Komitato la antaŭan sabaton, ke **neniu** parolu pri la **organiza demando dum la Ferma Kunsido,** la **reprezentanto de UEA** tion faris kaj la Kongresa Prezidanto devis atentigi la ĉeestantaron pri tiu maldeca agado.

(Laŭ la materialo originala.)

Ni laboru! Kaj estu paco en Esperantujo!

Jen la titolo de tutpaĝa artikolo en Heroldo de 27. aŭg., kiun ĉiu legu!

Ni nur povas elĉerpi el la fino: „Ni do bedaŭras, ke en Varsovio la reprezentantoj de nuna UEA denove ne komprenis la sencon de la unuigaj klopodoj; tamen ni estas kontentaj, ke almenaŭ estas farita „provizora paco“. ... Tamen: nur unu organizo povas esti, kaj nur unu estu, la rekonata „oficiala“ internacia organizo. Kaj tiu laŭ la faktoj nuntempe povas esti neniu alia krom Internacia Esp.-Ligo. Oni povas doni la gvidadon en la manojn de aliaj personoj, oni povus eĉ, eventuale, redoni ĝin en la manojn de ĝiaj antaŭaj gvidantoj. Ĉion ĉi oni povus fari kondiĉe, ke la rimedoj kaj cirkonstancoj permesu kaj ke la plimulto konsentu. Sed oni nepre ne klopodu, denove disrompi la unuecon de la oficiala intern. organizo, tuŝante ĝiajn fundamentajn principojn. — Daŭrigu sian vivon UEA kiel aparta asocio, se iuj personoj nepre volas havi apartan organizon de individuaj membroj; sed ne plu ĝenu ĝi per atakoj la laboron de IEL, la rekonita oficiala organizo!

Kaj **estu paco!**

IEL.

La membraro de IEL kreskis depost la Kongreso en Varsovio de 10.000 al 11736.

Aliĝis **Jugoslava E.-Ligo.**

Ĉefdel. de IEL por Italujo fariĝis Univ. prof. d-ro Giorgio Canuto, Torino.

Internacia Esperanto-Ligo, Filia Oficejo **en Stockholm,** kiu vigle laboras sur la

Oficiala poŝtmarko kun Esperanto.

Brazila Registaro eldonis jubileo-poŝtmarkon. La belaspekta poŝtmarko je 300 Reis prezentas globon, ĉirkaŭita de rubando kun la enskribo en Esperanto „Ora Jubileo de Esperanto“, kaj portas sur la dekstra supra parto 1887—1937.

Koran gratulon al Brazila Registaro!

kampo de propagando, per cirkulero instigas la estrarojn de la landaj asocioj al propagando kaj donas ekzemplojn.

———

Por eviti prokraston en la respondo!

En Aŭstrio pritraktas la **organizajn** aferojn memkompreneble sole le reprezentanto de IEL

Aŭstria E.-Asocio, prez. reg. kons. F. Stengel, Wien, XVII., Syringg. 3, la **turistajn demandojn** (radio, gvidiloj, foiro ktp.) sole

Esp.-Varbadservo por Aŭstrio,
Wien, I., Neue Burg.

Nepre aldonu respondkuponon!

Se vi deziras ricevi niajn belegajn **pro** spektojn, mendu ilin kompreneble ĉe **Varbadservo,** aldonu **resp. kup.** kaj vi ricevos tuj 2—3 gvidilojn diversajn kaj ankaŭ po 1 germanan E.-ŝlosilon kaj vortareton.

La ŝatataj redakcioj estas petataj, mencii la lastan punkton en sia gazeto.

———

La Antaŭkongreso en Praha.

Nur nun ni ricevis informon de partopreninto en ĉi tiu aranĝo. 5. aŭg. Interkonatiĝa Kunveno, dum kiu estis prezentataj belaj filmoj, disponigitaj de Komercministerio, kaj bona muziko sub direktado de s-ano Khel. La 6. aŭg. d-ro Pitlik malfermis la festkunvenon, en kiu krome salutis vicprez. deEACSR Ginz kaj klubprez. Ŝustr. La festparoladon faris J. Glück el Nederlando. Poste komuna tagmanĝo, rondveturado tra bela „Zlata Praha“ (Ora Praha), akcepto en la urbdomo flanke de vicurbestro Tilinek, lasta ĉeesto en kunveno kaj akompanado al la stacidomo, por veturi al Varsovio. Adiaŭ kaj ĝis revido!

———

XXX-a Universala Kongreso

London, 26. julio—6. aŭgusto 1938.

Adreso: LKK de Univ. Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Anglujo.

Kotizo ĝis fino de 1937 anglaj ŝilingoj 20, poste altiĝos ĝis 30. Aŭstrianoj povos pagi aŭ. ŝ. 26.50 al la ĉefdel. de IEL, G. Weber, Wien, I., Neue Burg.

Aliĝis ĝis nun pli ol 150.

LKK eldonis belegajn glumarkojn, 50 pecoj 2 resp. kup.

Oficiala organo: Ĉiu kongresano ricevas la gazeton „The British Esperantist“ de januaro ĝis julio kaj poste la numeron, kiu enhavos la raporton pri la kongreso.

———

3-a **Kongreso de Internacio de Proleta** Esperantistaro (IPE) en Paris (7.—12. 8.) decidis translokigon de IPE-Centro al London (Mrs. G. M. Keable, 35 Lidfield Rd, London N. 16) kaj de la redakcio al Belgujo. La venonta kongreso okazos en Barcelona.

———

Atentu!

Kiu sendos al s-ro A. Couto Fernandes, Rua Alice 23, Rio de Janeiro, Brazilio, du poŝtajn respondkuponojn, ricevos rekompence ekzempleron de la komedio „Amo per proverboj“ kaj 3 ekzemplerojn de la brazila poŝtmarko memore al Ora Jubileo de Esperanto, unu sur koverto kaj unu en ĝi.

Kiu sendos 3 resp. kup. ricevos ankoraŭ du el la antaŭaj poŝtmarkoj kun E.-teksto.

Esperanto kaj Radio.

Kun granda plezuro ni povis konstati, ke en la lasta tempo Esperanto ĉiam pli kaj pli trovis eniron en la Radio-kampon!

Tio **ne** estas sekvo de **ideala sentimento** flanke de la koncernaj Radio-stacioj aŭ de la en la afero interesitaj registaroj, sed **simpla sekvo** de la **granda varbadvaloro** de Esperanto, montrita en la granda intereso, kiun ĉiam donis la esperantistaro, ĉu grupoj ĉu izoluloj, al la varbado pere de Esperanto en Radio!

Do **simple la helpo,** kiun donas Esperanto al la koncerna lando, ĉu por konatigi la spiritajn trezorojn en la muziko, literaturo, muzeoj, arto, ktp., ĉu la pejzaĝajn belegaĵojn kaj popolkutimojn, al la Eŭropa esperantistaro, por instigi ĝin veni en la koncernan landon kaj amikigi ĝin al tiu lando, estas la **kaŭzo,** ke oni ne nur en gvidiloj tra la landoj kaj urboj, varbiloj por foiroj, komercaj propagandiloj ktp., sed **speciale en Radio** uzas la servojn de Esperanto.

Tiamaniere ili direktas **sian inviton senpere** al la vojaĝemaj esperantistoj en ĉiuj landoj de la mondo.

Paris, Kaunas, Tallinn gvidas kursojn en Esperanto.

Brno, la verda stacio, kun **M. Ostrava** kaj **Praha** eĉ ĉiumonate disaŭdigas teatraĵojn kaj nun operon.

Lyon PTT ne nur mem disaŭdigas ofte, sed eĉ transprenas la operon „Kiso“ la 7. oktobro de la ĉehoslovakaj stacioj.

Roma ĉiusabate je la 19 h disaŭdigas dum 25 minutoj prelegojn pri Italujo kaj ricevas la prelegojn de la Ministerio por Propagando. Nia s-ano Blasimme en Roma ne nur prelegas, sed ankaŭ devas respondi la grandan korespondaĵon de la Radio-stacio.

Hilversum, Kortrijk, Montpellier-Languedoc, Tartu, Tallinn, Klaipeda regule semajne dissendas same kiel **Rio de Janeiro** kaj **Rosario en** Sudameriko.

Lille, Wallonia neregule dissendas.

En **Wien** jam de 1925 ni **havis** kursojn kaj dissendojn regule ĉiun semajnon; depost 1933 regule ĉiusemajne flanke de Varbadservo; en 1935/6 kaj 1936/7 **kursojn** kaj **krome kvarfoje kaj poste dufoje en la monato prelegojn.**

Ne pro idealismo ni havis ĉi tiujn dissendojn, sed Esperanto multe laboris **pere de ĉi tiuj dissendoj por Aŭstrio!**

Ne imagu, ke Radio-Wien kun **granda entuziasmo** disponigis la tempon por kursoj kaj prelegoj!

Sed speciale nia **Ministerio por Komerco kaj Trafiko** montris grandan komprenon kaj intereson por ĉi tiuj dissendoj kaj subtenis niajn klopodojn, kvankam en la Radio-stacio oni ĉiam estis iomete neamika al Esperanto!

Ankaŭ ĉijare la Ministerio **subtenis** nian koncernan peton al Radio-Wien!

Sed Radio-Wien, montrinte sian malinklinon al Esperanto, fininte la kurson 2 monatojn antaŭ la aliaj lingvokursoj, decidis

a) **ne plu okazigi E.-kurson,**

b) **nur permesi unu** 10-minutan prelegon en la monato post la 22. horo.

Alvenis al mi kiel kursgvidanto kaj gvidanto de Esp.-Varbadservo por Aŭstrio la skriba deziro de 4000 personoj el alilandaro kaj de 2000 el Aŭstrio, ke **mi** en **nunjara oktobro denove** gvidu **E.-kurson**



Ŝoseo trans Pack-montpasejo interligas Stirion kun Karintio.

inter 18—19 h kaj **krome,** ke okazu flanke de **Esp.-Varbadservo p. Aŭstrio ĉiusemajne** 10-minuta prelego pri Aŭstrio.

Sed tiu grandioza manifestacio ne ŝanĝis la opinion de la Radio-stacio.

Mi dankas je tiu okazo al ĉiuj grupoj kaj izoluloj, kiuj skribis al mi kaj deziris helpi!

Se vi **ĉiuj,** grupoj kaj izoluloj, havas la intereson, ke la **sola germanlingva Radiostacio daŭrigu la kurson kaj la semajnajn prelegojn, bonvolu** afable **esprimi** ĉi tiun **vian deziron, petante** nian altŝatatan kancelieron d-ro von Schuschnigg, Wien, I., Bundeskanzleramt, **ke la kanceliero,** kiu tiel afable en 1934 dum la Internacia Konferenco „Esperanto en la Lernejon kaj Trafikon“ akceptis kiel instruministro la konferencanojn al teo, kiu en 1935 kore invitis la esperantistaron al la Universala Kongreso en Wien 1936, kiu transprenis la honorprezidantecon de nia XXVIIIa en 1936 kaj kiu per afablaj kaj koncerne Esperanton rekonemaj vortoj distingis la januaran numeron 1937 de Aŭstria Esperantisto, — **helpu pro la intereso de la esperantistaro** kaj en la intereso de Aŭstrio, por ke la **E.-kurso** kaj **la vesperaj prelegoj ĉiusemajnaj** denove estu envicigotaj **tuj** en la programon de **Radio-Wien sub la ĝisnuna gvidado!**

Mi mem petis jus en ĉi tiu afero pri akcepto en aŭdienco ĉe nia Kanceliero kaj ankaŭ ĉe la Ministro por Instruaferoj.

Steiner, gvidanto
de Esp.-Varbadservo por Aŭstrio.

———

Radio Brno, Praha, M. Ostrava disaŭdigos
7. okt. je 22 h 35 — 23 h 30
en **Esperanto** la operon de Smetana
La Kiso.

Radio Lyon PTT, (Francujo) **relajsos** la operon. La **unuan** fojon, ke Esperanto-disaŭdigo estas relajsata per fremdlanda radio-stacio.

Aŭskultu, diskonigu kaj **skribu** al Radio-Lyon PTT gratulon!

Ni kore gratulas al ĉi tiu sukceso!

———

En oktobro okazos la prelego „Kial al vintrosporto Aŭstrion?“ — Do la 22. de oktobro estos la sola prelego dum oktobro kaj tio nur ŝanĝiĝos, **se vi tion iniciatos!**

Hilversum II (22.40—23.10 dimanĉevespere): 17. X. parohestro Eras „La vivo post la morto"; 31. X. G. Nivard, Groningen „Pri la grafologio."

TUTMONDA ADRESARO de la ESPERANTISTOJ 1938.

Aperdato: 15. decembro 1937.

Findato por sinanonco: 15. novembro 1937.

Jam kolektitaj adresoj: pli ol 3500.

Kotizo por **enpresigo** de nomo kun profesio kaj adreso, eventuale aparteneco al grupo aŭ organizo **1 angla ŝilingo aŭ** 2½ **intern. respondkuponoj poŝtaj.** Por ĉiu sumeto vi ankaŭ ricevos la **adresaron afrankite.** Aldono de **anonco** koncerne kolektadon aŭ korespondadon ktp. **ĝis 8 mallongaj vortoj kroman kotizon samaltan.** Se vi sendos 3 resp. kup., vi ricevos je deziro germanan ŝlosilon kaj vortareton.

Grupoj estas **senpage enpresitaj**, sed ili **nur** ricevos la Adresaron **enpage,** se **almenaŭ 10 membroj** pagis la kotizon.

Grupoj diskonigu en viaj rondoj, por ke multaj aliĝu kaj montru la grandon de via organizo.

Landaj Organizoj instigu viajn anojn al aliĝo, por ke kiel eble **plej multaj lokoj** el via lando estu en la Adresaro, per tio montrante la disvastiĝon de via organizo.

La **ADRESARO** estu bonega propagandilo por nia movado kaj montru al la dubemuloj, ke Esperanto fakte prosperas kaj progresas.

Ni esperas, ke **almenaŭ 100 landoj** kun **pli ol 3000 lokoj** enestos la ADRESARON!

Grave: Jam anonciĝis HOTELOJ, KURACLOKOJ, KAFEJOJ ktp. por la ADRESARO, por doni por tio al la esperantistoj faciligon en la vojaĝado. Instigu en via loko ankaŭ tiujn entreprenojn. Ili pagos por 2 linioj **2 angl. ŝ.** kaj por ĉiu plua linio (ĝis 8 mallongaj vortoj) **kromajn 2 ŝ. La plej malmultekosta, sed bonega propagando!**

Pagmaniero aŭ per **intern. resp. kup.** poŝtaj aŭ al **aŭstria poŝtŝparkasokonto** D 123.826 sub la nomo „Aŭstria Esperantisto, Korneuburg" (aldonante 15 aŭstriajn groŝojn por la elspezoj) aŭ sendante **neuzitajn poŝtmarkojn** (sed diversajn: ekzemple 5, 10, 15, 20, 25, cent. ktp.) en la valoro de la anglaj ŝilingoj kun **aldono de 10%.** En **Anglujo** oni povas pagi al **Brita E.-Asocio,** en **Francujo** al **SFPE,** en **Hungarujo** al la **Landaj Asocioj aŭ Literatura Mondo,** en **Italujo** al **Itala E.-Federacio. Ĉiam aldonu 10% por la kostoj.**

Ĉiu klopodu, tuj aliĝi kaj havigi al si la TUTMONDAN ADRESARON!

Tutmonda Adresaro ĉe Int. Esperanto-Muzeo, Wien, I., Neue Burg:
Steiner.

La **ĝusta fundamento** por Esperanto estas la malmultekostaj libroj el **Tagblatt-Bibliothek,** Wien, I., Wollzeile 20.

Esperanto en 10 lecionoj. Metoda enkonduko por meminstruo k. kurso (21.—23. milo, nro 230 de la biblioteko) S —.52

Unua Esp.-legolibro p. komenc. k. kurso. Elektita prozo k. poezio k. laŭvorta germ. traduko. 6.—10. m., nro 283 S —.52

Vortaro Esp.-Germana. Kun ĉiuj de Akademio rekonitaj vortoj k. fakesprimoj. 22.—24. m., nro 335 S —.52

Vortaro Germana-Esp. 180 paĝa k. 20.000 germ. vortoj k. 30.000 E.-tradukoj. 14.—16. m., nro 385 ĝis 388 S 2.08

Mi parolas Esp.-on. Enkonduko en la E.-konversacion k. vorta germ. trad. k. klarigoj. 6.—8. m., nro 426 S —.52

Esperanta Komerca Korespondo. Komercaj modelleteroj en E. kun akompanteksto germ. nro 500/1 S 1.04

Zamenhofaj Kongres-paroladoj. Ĉiuj de Zamenhof faritaj kongresparoladoj kun germana trad. 170 pĝ. S 2.08

Eldonanto Dro Emil Pfeffer, Haveblaj en ĉiuj librovendejoj kaj ĉe la eldonejo.

INFORMOJ EL AŬSTRIO

Grava konfeso al Aŭstrio.

Univ. prof d-ro Hans Horst Meyer en Wien, kiu en majo okaze de la 100-jara jubileo de „Asocio de kuracistoj" ricevis sian dekan „Honor-doktordiplomon" je tiu okazo diris: „Mi devas hodiaŭ de ĉi tiu loko kaj en ĉi tiu okazo prezenti al la aŭstria lando, fariĝinta por mi ĉiama hejmlando, kaj al ĝiaj bonvolaj administraroj la esprimon de plej profunda dankemo: al ĉi tiu Aŭstrio kun ĝia miljara, profunda kaj abunda kulturo, kun ĝia nun florornamata Wien, tiu ĉi plej bela urbo en la mondo, kun ĝiaj varmkoraj homoj, kiuj akceptis la fremdulon el la nordo kiel unu el ili, tiel ke mi baldaŭ lernis — malgraŭ la neforigebla sindonemo al la hejma orientprusa tero —, senti min ĉi tie hejma kaj fariĝi, kia mi estas: fidela kaj el plej profunda animo dankema civitano de Aŭstrio."

(Laŭ „Zeitgeist" de „Heimatdienst"-Wien.)

Esperanto en la Aŭstria Trafiko.

Ĝeneraldirekcio de Poŝtoj kaj Telegrafoj kun **ĉiuj direkcioj** en Aŭstrio same **Ĝeneraldirekcio de Federaciaj Fervojoj** per komunikoj en la oficialaj „Komunikiloj" invitis siajn subulojn partopreni, ankaŭ en la intereso de la deĵoro, en E.-kursoj de la landa organizo de IEL, nome Aŭstria E.-Asocio, aŭ en kazo de malhelpo, partopreni en skriba kurso de kort. kons. Steiner.

„Bundespressedienst" (Gazetarservo en Federacia Kancelierejo) sendis al ni 4 gazetojn

Zagreber Morgenblatt
Salzburger Volksblatt
Grenz-Echo en Eupen, Belgujo
Klagenfurter Zeitung

kun longaj artikoloj de d-ro Adler pri „Interpopola kompreniĝo per interlingva kompreniĝo".

La oficiala **Nachrichtenblatt der Pressestelle der Oesterr. Verkehrswerbung — Werbedienst des Bundesministeriums für Handel und Verkehr** (Informilo de gazetservo de Ministerio por Komerco kaj Trafiko) publikigis en sia nro 3 artikolon **„En Wien estiĝas la unua Esperanto-Adresaro".**

Internacia Esperanto-Muzeo

Wien, I., Neue Burg, Aŭstrio.
Kolizo unufoja: 17 sv. fr.

Nova membro:

Leo Cogen, pacjuĝisto, Ninove, Belgujo.

Donacojn sendis: BEA, London; J. Wagner, Paing; SFPE, Paris; Int. As. Bellamy, Velsen, Ned.; Steiner, Bisamberg; Jon Capatana, Bucuresti; J. Roze, Riga; J. v. d. Wijser, **Eindhoven;** mondmigranto Marin; Feder. de Lab. Esp., Amsterdam; IALA, New-York; ges. Yelland, Aspremont; Infanoj sur Tutmondo, Besse-sur-Issole; Literatura Mondo, Budapest; E.-eld. Muusses, Purmerend; Nisida-Ryoya, Saihozi, Jap.; Int. Language Ido-Soc., Woodford-Green; Janis Roze, Riga; La Medecina Katalana, Barcelona; M. Mangivas, Athen; L. Cogen, Ninove, Nederl.; G. Cesarini, Potenza; Kei Sibajama, Kioto.

Sendu al Int. E.-Muzeo en Wien ankaŭ gazetojn, kiuj kontraŭbatalas E-on!

EL LA MONDO

Universala Esperanto-Asocio, Genève, translokiĝis al Palais Wilson, Genève.

XI-a Somera Universitato en Debrecen, kiun frekventis nunjare 700 personoj, ankaŭ havis E.-kurson, kiun en 16 lecionoj gvidis d-ro V. I. Zempléni.

Vojaĝado al Nordo. S-ano Ivan K. Krestanoff, L. K., publicisto, el Sofia, Bulgarujo, entreprenis post Jubilea Kongreso, kie li ĉeestis kiel oficiala delegito de Bulgara Ministerio de Komerco, Industrio kaj Laboro, vojaĝon tra Polujo, Danzig, Litovujo, Latvujo, Estonujo, Leningrado, Finnlando, Svedujo, Norvegujo, Danujo, Islando, Portugalujo. Li venos ankaŭ dum la revojaĝo al Aŭstrio. Li veturas kun studmisio kaj por fini sian ilustritan verkon „Tra Eŭropo per Esperanto".

Praha. Belega 12-paĝa, grandformata gvidlibro, kies belaj bildoj respegulas la ege interesan, antikvan urbon, aperis dum XXIX-a. Ankaŭ ekskursoj al aliaj interesaj urboj estas menciitaj, sed ne la eldoninto de la bela presaĵo. Sed nepre vi povas mendi ĝin ĉe Esp.-Asocio en ČSR, Praha 47.

Gvidfolioj, afiŝoj:

Urbestraro de **Jičin** eldonis grandan, belan afiŝon, invitante al vizito.

Urbestraro de **Karlsbad** (Karlovy Vary) aperigis novan eldonon de sia bela faldprospekto (16 pĝ.), riĉe ilustrita, sub la titolo „Mondfama kuracbanloko Karlsbad, Ĉeĥoslovakujo".

En **Lažne Behlohrad** aperis 4-pĝ. prospekto pri la banloko kaj sampaĝa pri E.-kursoj.

Vortaron de fizika geografio intencas starigi s-ro Robert Gérard, prof. en Kolegio de Châlons-sur-Marne, Francujo. Interesatoj skribu al li.

„Mitteilungen des Hoerbiger-Instituts", Wien, XI., Braunhuberg. 23 en sia ĉijara numero kiel en la antaŭjaraj publikigas parton de la artikoloj en „Occidental".

S-ano Josef Schaefer, Wien, XVIII., Weitlofg. 15/21, proponas fondon de „Mond-organizo de libervolaj katolikaj samarianoj" kaj deziras unuavice la konon de Esperanto. Informojn kontraŭ respondaĵranko.

Manchester Publikaj Bibliotekoj eldonis 7-pĝ. liston de la envicigitaj E.-libroj.

Mortis **N. Nathans,** sekr. de Int. Transportlaborista Federacio en Amsterdam pro akcidento de flugmaŝina katastrofo. Li estis fervora amiko al Esperanto kaj multe helpis por ties disvastigado en la rondo de laboristoj.

Mortis la 17. V. advokato **d-ro Ludwig Goldberger,** prez. de Germana E.-Grupo „Verda Stelo" en Prag, 70 jara. Li estis meritplena longjara kunlaboranto en nia movado.

Kial oni abonu rapide nian gazeton por 1938?

Ĉar Aŭstria Esperantisto en 1938.

a) daŭrigos sian laboron, prezenti al vi bonegan gazeton, informi vin pri ĉiuj novajoj en la movado, doni al vi bonegan literaturan parton, prezenti multajn bildojn, perfektigi vin per bona stilo kaj gramatikaj informoj kaj klarigoj, konatigi al vi literaturajn novaĵojn, entute doni al sia legantaro — kion gazeto entute povas doni;

b) donas al ĉiu abonanto, kiu **ĝis mezo de decembro** pagos la abonprezon (aliland-anoj 8 resp. kup., Aŭstrianoj S 4.60), la sama validas por tiuj, kies abono pagita daŭras trans la jarfinon (ekz. ĝis aprilo 1938)

1. **senpagan dulinian anoncon unufojan,**
2. **ege rabatite** jenajn librojn:

   Somera Universitato anstataŭ ŝ 3.— nur 1.80 (3 int. resp. kup.), 64-paĝa kun 18 prelegoj el 11 landoj, tre grava helpilo por propagando;

   Albumo de Wien kun 106 bildoj kaj klarigoj en Esp., belegaj fotoj, anst. ŝ 3.— nur 1.80 (3 irk.);

   „Per aŭtobuso tra Aŭstrio", 80-pĝ. detala gvidlibro kun 70 belaj bildoj, anst. ŝ 1.80 nur 1.20 (2 i. rk.);

   „Antaŭaj cirkonstancoj", burleskaĵo, 40-pĝ., anst. ŝ 0.60 nur 0.40;

   „Freude durch Esperanto", germana lernolibro, 96-pĝ., anst. ŝ 2.40 nur 1.80 (3 i. rk.);

   „Germanlingva ŝlosilo" po 5 nur ŝ 0.60;

   „German-Esp. Vortareto", 36-pĝ., malgrandformata, po 5 nur ŝ 0.60.

   Ĉiuj prezoj estas jam **kun afranko!**
3. **20% rabato** por la **venontjara** TUTMONDA ADRESARO, do por tiu, kiu aperos en **decembro 1938!**
4. **25 pecojn** de la noveldonota glumarko de Aŭstria Esperantisto, **senpage,**
5. por **ĉiu** alsendita interesa, konciza **artikolo** kun bildo aŭ poemo 2 numerojn de la koncerna numero de AE.

Do **repagu** vian abonon ĝis mezo de decembro!

Neabonintoj rapidu aboni nian gazeton! La juĝoj pri ĝi el tutmondo montras, ke ĝi plaĉas!

Samideane Steiner, eldonanto.

Mia vojaĝo al Italujo.

Post 8 jaroj mi fine faris kun mia edzino la unuan feriovojaĝon al Italujo kaj mi mencias tion por danki al la karaj samideanoj, kiuj tiom helpis al ni kaj agrabligis nian restadon.

En Venezia atendis kaj zorgis pri ni mia malnova amiko Bonini, en Roma ges. Minaia kaj en Napoli ges. dro Koch.

Koran dankon al ili kaj al la multaj aliaj s-anoj, kiuj venis en kunvenon, por travivi kelkajn agrablajn horojn kun ni.

Steiner.

EL LA LEGANTARO

„... Mi treege aprobas vian intencon publikigi Tutmondan Adresaron de esperantistoj. ... Mi formis grupon kaj gvidis ĝin dum 10 jaroj en Victoria, kie dum 1923 mi broadkastis dum unu jaro en kaj pri Esp. En 1928 mi iris al Kalifornio, daŭrigis mian laboron, sed estas tre malfacile interesigi Usonanon pri la lingvo. Mi nun estas 78-jara kaj restas fidela via s-ino Alice Wicks-Weigall, El Cajon, California."

„Mi volas esperi, ke post la kongreso vi trovis la merititan ripozon. Preferinde estas malatenti la atakojn de l' homoj sin nomantaj ‚pacemuloj!'.

IEL ludis laŭdindan rolon; ĝia konduto, dum la kongreso, ricevis laŭdojn de la plimulto de la partoprenintoj. Estu tio konsolo por la malfeliĉaj komitatanoj ... G. Saget, Elbeuf."

„Mi tre entuziasme laŭdas Vian tre praktikan kaj utilan iniciaton pri Tutmonda Adresaro. Instituto Itala de Esp., prof Grazzini, Firenze."

„Mi gratulas vin pri la bona ideo de Adressaro. J. L. Mackenzie, Newport, Anglujo."

„Akceptu nian koran dankon pro via granda kaj nobla Esperanto-agado. Tamen ni devas bedaŭri, ke ĝi tro frue ĉesis ĉe Radio-stacio dum aliaj kursoj ankoraŭ daŭras, kial aperis nubo kaj faris ombron? Vere distinga estas via radio-Esperanto-instruado, ĝi havas bonegajn du instru-signifojn, ĉar germano povas lerni Esp-on kaj esperantisto, apartenanta al alia nacio, havas eblecon lerni germanan lingvon.

... Vivu Viena Esp.-vigleco kaj ĝentileco! ...
Esperanto-Klubo, Celje, Jugoslavujo."

„La sendita kajero ‚Wir bauen auf' estas vere belega kaj impona, estas domaĝe, ke ne esperantlingva! Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo, Budapest."

„Ni trovas vian revuon ‚Aŭstria Esperantisto' tre bela kaj vere leginda. E.-grupo ‚La Katolika Sudo', Maastricht, Nederlando."

„En Aŭstria Esperantisto" (majo) belaj fotografaĵoj pri kablofervojo (teleferoj) kaj interesa artikolo kun bildoj pri novorganizoj ĉe Federaciaj Fervojoj. Bulteno de ISAE, Paris."

Francujo. E.-klubo kun 500 membroj estas Lyon-a Universitata E.-Klubo. La ĉiutaga gazeto „Lyon républicain" enhavas semajnan E.-rubrikon.

D-ro P. Corret-Paris † konsilis.

Ĉiu esperantisto devus ĉiutage legi kaj studi kun la plej granda atento almenaŭ unu paĝon de D-ro Zamenhof.

Se la esperantistoj sekvus tiun bonegan konsilon, la ĝenerala kono de nia lingvo estus pli granda, la stilo uzata de granda nombro da samideanoj fariĝus pli kompreneblа pro lernado el la sama fonto; eĉ la nombro de la uzataj vortoj ... fariĝus pli malgranda pro la fakto, ke Zamenhofaj vortoj nelernitaj, do nekonataj, ne estas uzataj, kaj oni alprenas aliajn.

Dangere estus, se la studado de la verkoj de nia Majstro estos iom poste forlasata, por prefere studi laŭmode verkojn de malpli fidindaj aŭtoroj, ol la aŭtoro mem de la lingvo.



Bela aŭtoŝoseo ĉe Petronell, Malsupra Aŭstrio.

Oni memoru, ke Esperanto povas kaj povos ĉiam utili, nur se ĝi estos vere internacia lingvo kaj posedos „lingvan unuecon ĉiean kaj ĉiaman", kaj ke tiu unueco povos ekzisti, nur se ĝi apogiĝos sur firma fundamento, kiu nur povas esti la verkoj de nia porĉiama majstro D-ro L. L. Zamenhof.

El la albumo de s-ro Felix Moscheles †.

„Ekzistas homoj, al kiuj la aĝo blankigas la harojn, sed tute ne tuŝas la koron, kiu restas ĉiam en plena freŝeco kaj juneco kaj ĉiam kun egala forto batas por ĉio bela kaj bona. Ĉiufoje kiam mi vidas tian homon, mi diras al mi: ‚Jen estas bela minuto en mia vivo.'" (Unua Kongreso Esperantista en Boulogne.)

L. Zamenhof.

Je memoro al Amelio Earhart,
la bravega aviadistino.

Pereis sen krio aviadistin'
Earhart Amelio, tre brava aglin'
Fluginte al gloro, kronita de l' laŭr' ...
Je tiu ĉi horo super la Centaŭr'
Jam estas animo de ŝi ĉe la tron'
De Dio, sen timo, kiel di-duon',
Rakontas al Dio ŝi pri l'akcident',
Brava Amelio, kiel ŝin la vent'
Jetegis tre forta al la ocean';
Kie ŝi — korp' morta — (kun korp' de Noonan')
Nun naĝas sen spiro, sen viv' kaj sen san' —
Al ili, kun liro ... sonu la pean'!
Kaj ploru, frataro! ke ŝi mortis jam;
Ke naĝas en maro ŝi, bela ornam'
De nia Usono kaj tuta homar';
Do de Albiono kaj eĉ de Buŝar'
Kaj de la Meksiko kaj eĉ de Rusuj',
Ĉie do publiko nun ekploru tuj'!
Kaj de la Nippono kaj Esperantuj',
(Ne nur de Usono) ĉie ploru tuj!

Kazis Vidikaŭskas, Philadelphia, USA.

Multekosta legajo.

La angla poeto Spencer iam venis, kiam li ankoraŭ estis malriĉa kaj nefama, en la gastaman hejmon de Lordo Sidney kaj igis transdoni al li sian plej novan verkon. Ĉar la lordo ne havis alian por fari, li komencis legi en la tre ampleksa libro. Je tio li ekentuziasmiĝis pri la bele verkitaj kaj bonegaj versoj tiel, ke li ordonis al sia ĉambelano: „Donu al la poeto 50 pundojn sterlingajn." Poste li daŭrigis la legadon kaj vokis post kelkaj minutoj: „Donu al la talentulo 100 pundojn." La ĉambelano hezitis. Sed la lordo ĉiam plulegis, venis ĉiam pli en la sorĉon de la pensoj de la

juna poeto, ĉiam pli profunde en la sorĉon de la belsono de l' lingvo, kaj fine li elkriis, sovinte la ĉambelanon tra la pordon: „Donu al ĉi tiu sorĉisto 200 pundojn, sed eligu ĉi tiun fiulon, alie li bankrotigos min." Trad. Betty Schober-Wien.

Poŝtkarto.

Nova bakita esperantistino tro uzis la akuzativon en sia poŝtkarto al mi, tial mi respondis tute senakuzative, jene:

Fraŭlino,
ĉu vi ne timas,
ke via prozo tro rimas,
estas peza, malaktiva,
pro l' finiĝo akuzativa?

Konvena ja estas ĝi,
sed ŝparema estu vi!

Se tro fervore vi laŭdas,
se tro multe vi aplaŭdas,
ĉie, ĉiam ripetante,
pri l' oreloj ne zorgante,
l' akuzativo malplaĉas,
ĉar la frazoj sonoraĉas!

Belsoneco estas tre grava,
do ne estu vi malprava!

(Gazeto de Ameriko.)

Memmortigo de balenoj. — Kvindek balenoj surteriĝis en Sudafriko kun furioza ŝprucado de akvo kaj restis por morti sur la rokoj. Sciencistoj el la sudafrika muzeo en Johannesburg rapidis tien por studi la aferon.

KOMERCO

Internacia Foiro de Rio de Janeiro, 12. X. — 15.XI. 1937 eldonis vere belajn propagandilojn; ili vere estas la plej belaj ĝis nun aperintaj. Faldprospekto kun la plano de la Foirtereno kaj 34 belegaj bildoj. Ni gratulu al la lando Brazilio!

Vegetara restoracio **„La Verda Stelo"** Paris (Etoile), 16 Rue Brey.

Hotel-Pension de Famille „Eole", Malo-Les-Bains, Francujo, donas 5% rabaton al esp-istoj. Esperanto parolata.

„Likvoron Esperanto" vendas la firmo Bobula en Košice, ČSR.

Alkoholajoj kun nomo „Verda Stelo" estas jam de jaroj fabrikataj en Praha-Žižkov de Emil Dynybyl.

Pulvoro por harlavado „Bonega" estas vendata en Praha.

Praktikaj kunmeteblaj **pordoŝildoj** sub la marko „Nomo", fabrikataj de Josef Levitus en Praha.

KOLEKTANTOJ

Poemo pri kolektanto.

Ekzistas diversaj homoj en la mondo;
tial ankaŭ en nia verda rondo
ekzistas diversaj tipoj
kun diferencaj principoj.

Kelkiuj sin okupas per poŝtmarkkolektado
aŭ per senkulpa korespondado.
Ĉu por praktiki Esperanton?
Ne! por trovi amanton!
Unuvorte: senkulpec' naiva, dolĉmotiva!

(El Bulgara E.-isto.)

Ŝlosilo de internacia filatelista korespondado.

Eldonejo de Tutmonda Kolektanto, celante plifaciligi la interŝanĝajn rilatojn inter diversnaciaj filatelistoj kaj dokumenti la praktikan uzon kaj utilon de E., eldonos aŭtune „Ŝlosilon de . . .".

La broŝuro enhavos ĉiujn en internacia korespondado filatelista uzatajn frazojn en 5 lingvoj: Esperanto, ĉeha, germana, franca kaj angla. Kompilanto estas s-ano V. Šavel, Praha. La broŝuro jam estas en preso kaj kostas ĝis fino de 1937 5 kč ĉe Tutmonda Kolektanto, Jablonné n. Orl. ČSR.

Novaj glumarkoj eldonitaj de:
XVII-a Kongreso de SAT. en Rotterdam.

RECENZOJ

„Farado kaj analizo de la malsimplaj vortoj" de M. Rollet de l'Isle, prezidanto de la Esperantista Lingva Komitato. Propra eldonejo, 28 pĝ., 1936.

„Logika Esperanto" estas la ĉeftitolo de la verketo, kiu certe faros multan utilon al niaj samideanoj, studinte ĝin. La uzado de la malsimplaj formoj de la verbo estas ofte malĝusta; tial ĉi tiu verketo servu por plibonigi ĝin. Partojn ni publikigos en la „gramatika parto" de nia AE. St.

„Raportoj kaj konkludoj de Internacia Konferenco Esperanto en moderna vivo", Paris 14.—17. majo 1937. 142 pĝ., 1937, prezo 10 fr. fr., afrankite 12 fr. fr. ĉe Societo Franco por Propaganda de Esperanto, Paris, (10), 34 Rue de Chabrol.

Tre rapide aperis ĉi tiu raporto kaj ni devas gratuli al la verkintoj. Kiel jam la titolo diras temas pri la raportoj el la diversaj fakoj de lernejoj kaj la moderna vivo kaj ne estas eble priskribi la enhavon. Ĝin oni devas legi, trastudi kaj helpi al efektivigo de la problemoj. Tial ĉiu tuj mendu la verkon.

Muusses Esperanto Biblioteko, Purmerend.

Joseph R. Scherer „Tra Usono kun ruliĝanta hejmo". 34 pĝ., 35 ned. cendoj, 1937; n-ro 4 en la vico.

Nia amiko Scherer en sia flua maniero priskribas la vivon en „ruliĝanta hejmo", kiun li havis dum la veturado sur pli ol 100.000 km tra Usono en societo de sia afabla, ĉiam ridetanta patrino. Kiuj aŭdis la paroladojn de Scherer dum lia lasta restado en Eŭropo ankaŭ vidis ĉi tiun „hejmon sur pneŭmatikoj" kaj la aliaj legu la libreton kaj mem informiĝu. St.

„La kongresaj paroladoj de d-ro L. L. Zamenhof", unua kaj dua partoj, volumoj 6 kaj 7.32 kaj 34 paĝoj, 1937.

Ĉiu esperantisto nepre konatiĝu kun la kongresparoladoj de nia majstro, kiuj estis por la tiamaj esperantistoj kvazaŭ mesaĝoj. La unuajn 7 oni nun prezentas al vi kaj aldonis ankaŭ la faman leteron de d-ro Zamenhof al N. Borovko pri „La deveno de Esperanto". La parolado de la Oka Kongreso troviĝas en la 10. volumo. — Je tiu okazo ni atentigas niajn legantojn, ke ĉi tiuj 8 kongresparoladoj jam antaŭ kelkaj jaroj aperis en „Tagblatt-Biblioteko" en Wien kun la germana traduko, verkita de d-ro Pfeffer en Wien. Prezo kun afranko aŭ ŝ 1.20 aŭ 2.— int. poŝtresp. kup. Ni peros al vi la libron.

Stjepan Mišak, Adana, Turkujo, eldonis „Informoj de E.-Domo en Adana" veŝtpoŝformatan. Nr. 1 a. Senpagea aldono al aĉetantoj de aliaj libretoj; alie 3 sinsekvaj numeroj kontraŭ 1 resp. kup.

„La fermo kaj sekigo de la Suda Maro", bele ekipita libreto, ornamita per multaj bildoj, faritaj el aviadiloj, montras la grandiozan verkon, kiun faris la nederlanda registaro. La E.-teksto estas verkita de inĝ. Isbrücker, prez. de LK. — La libreto estas havebla de Int. Cseh-Instituto de Esp., Haag, Riouwstr. 172.

„Hungaraj brodaĵoj", 24-pĝ. broŝuro kun 4-pĝ. kovrilo, verkita de Ladislao de Spolarich. Eld. Hungara E.-Federacio, Budapest, 1937. Responda eldonanto: Jozefo de Mihalik.

La teksto sur bela papero kaj en bela preso, pliriĉigita per 29 bildoj, informas pri ĉi tiu en Hungarujo kulturata arto.

A. Viruly „Por la honoro de nia lando", el holanda lingvo tradukis P. W. van Sijn. Eld.: D. Van Sijn & Zonen, Rotterdam, Ged. Bierhaven 25—29; 22 pĝ., prezo 25 cendoj ned.

Malmultaj skribaĵoj tiel multe meritas la disvastigadon en supernacia lingvo en la nuntempo kiel la bonega „pledado por aertragiko super la militpensado" kaj en ĉiuj landoj.

Sendu la verketon al viaj amikoj por kunhelpi dissemi tiun ĉi liberigantan vorton, por ke ĝi dissemu fruktojn.

„Libervola Civila Helpservo Internacia", eld. de la sekretariejo, Bern, Klaraweg, 16 pĝ., 1936; prezo 1 int. poŝtresp. kup. ĉe la trad.-into J. Gilliard, rue des Granges, Neuveville, Svis.

Enkonduka artikolo „Fosilo anstataŭ pafilo" de Edmond Privat. La celo de Int. Helpservo estas tute proksima al la idealo de Zamenhof. Mendu la interesan libreton, al kiu estas aldonata la regularo de la asocio mem. St.

„Aarsbereitning fra J. E. Ohlsens Enkes Plantepatologiske Laboratorium, 1. aprilo 1936—31. marto 1937", verkita de s-ano Paul Neergaard en dana lingvo kun E.-resumo, el kiu ni sciiĝas, ke temas pri kontrolo de malsanoj en 2081 provoj de diversaj hortikulturaj semspecoj. 11 paĝa, 1937.

„La vipo", naskiĝis en la kliniko de Literatura Mondo en aŭgusto 1937. Generis: la sopiranta popolo kaj la mortinta Pirato. Frapas ĉiumonate. — Laŭ la titolo la gazeto pritraktas satire la E.-demandojn nuntempajn.

Diksmuide en Belgujo eldonis 16-paĝan faldprospekton kun bildoj kun sinsekvaj tekstoj en la lingvoj flandra, Esperanto, franca, angla kaj germana.

„Orienta Kulturo", kvaronjara scienco-literatura ĵurnalo pri Orientalismo kaj Japanismo, riĉe ilustrita, eldonita de Societo de Orienta Kulturo, Komagome-Dozaka 228, Tokio. Ĝi akceptas artikolojn, precipe pri virinaj aferoj.

Litovujo. Litova Termezurista kaj Kultur-teknika Asocio eldonis 4 vidaĵkartojn kun tekstoj en litova kaj E.-lingvoj.

Eldiroj:

„Se vi kredus je la justeco, vi komprenus, ke por servi ĝin, oni suferas pro ĝi, oni mortas pro ĝi, sed oni ne mortigas pro ĝi."

Ekl. Patro Samson.

„Kiu sian patrujon faras idolo, altiras sur ĝin malbenon."

Tagore.

Zuilen (Utr.), Nederl. J. Labordus, Joh. v. Andelstr. 20, deziras korespondi.

En la teatro.

Sinjorino (al sinjoro, kiu sidas malantaŭ si): „Mi esperas, sinjoro, ke mia ĉapelo ne ĝenas vin."

Sinjoro: „Sed jes, sinjorino, ĝi terure ĝenas min, ĉar mia edzino deziras havi similan."

Dankon pro bonfaro!

Per helpo de centoj da geesp-istoj estis eble forsendi nian pacienton al Davos, Svisujo, por resaniĝi je blindiĝo. Tutkoran dankon pro la donace senditaj uzitaj poŝtmarkoj. Sed ni petas daŭrigu la sendadon, por ke ni povu sendi ankaŭ aliajn. Nova adreso: P. J. W. Schilperoord, Kreekweg 51 a, Usselmonde ĉe Rotterdam, Nederlando.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer", Wien, VII., Bandgasse 28.

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist“

Mitteilungsblatt für die Mitglieder des Oesterreichischen Esperanto-Bundes und der I. E. L.-Jugend

Nr. 10 (25) 5. Oktober 1937

Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Mundart

ist die Sprache unserer Heimat. Hunderte von Mundarten, darunter uns schwer verständliche, gibt es. Darum wurde als Einheitssprache für unser Gesamtvolk die über allen Mundarten stehende Schriftsprache

Hochdeutsch

geschaffen. So wie jedes Kulturvolk sich seine Schrift-Einheitssprache schuf, so bemühen sich seit Jahrhunderten Menschen, eine Einheitssprache für alle Völker zu schaffen. Ungeheuer groß ist die Zahl der Volkssprachen auf unserer Erde und die dadurch bedingten Schwierigkeiten im Verkehr mit Anderssprachigen. Unser, keine Entfernung kennendes Zeitalter verlangt eine neuzeitliche Lösung dieser Frage. Unsere Forderung ist: „Neben der Muttersprache die Einheitssprache aller Völker.“ Diese heißt

Esperanto

und ist nicht künstlich erfunden, sondern sinnvoll, mit den Volkssprachen als Grundlage, geschaffen worden. Als leichtest erlernbare Fremdsprache dient sie bereits Hunderttausenden verschiedenster Volkszugehörigkeit zur schriftlichen und mündlichen Verständigung. Der Rundfunk, die Messen und Propagandaministerien vieler Länder wissen diese Vereinfachung bereits zu schätzen.

Esperanto ist der Schlüssel zur Welt!

Auch Sie sollten es lernen!

(Aus dem Werbeanschlag der deutschen Esperanto-Gruppe in Gablonz a. N., Deutschböhmen.)

Dieser Anschlag großen Formates kostet einen Postrückschein beim Verfasser des Textes, Bruno Gahler, Gablonz a. N.

Die tschechoslowakischen Radiostationen werben für ihr Land vermittelst der Oper „Der Kuß“ von Smetana.

Radio-Lyon PTT (Frankreich) übernimmt diese Sendung.

Dies ist nichts neues, werden viele sagen, denn dies tun ja alle Radiostationen!

Ja, aber **nicht in Esperanto,** wie dies bei dieser Sendung der Fall ist. Musik ist international und Smetana ist international bekannt. Aber die **tschechoslowakischen Radiostationen** wünschen, daß auch der Inhalt der Oper zum besseren Verstehen der Musik den Esperantisten in ganz Europa bekanntgegeben wird, daher in Esperanto.

Die Esperantisten von **1500 Esperantogruppen** und **Runden** in Europa werden mit dankbarem Herzen den Darbietungen von Brünn, Prag, Mährisch-Ostrau und der Uebertragung im Sender Lyon PTT lauschen.

Diese Sender vollführen mit dieser Sendung eine **Großtat,** die ihren Ländern viele Freunde gewinnt — die **Esperantisten der ganzen Welt und all ihre Freunde!**

Wir gratulieren herzlichst und **empfehlen diese Großtat allen Radiostationen zur Nachahmung im Interesse ihrer eigenen Länder!**

Die Gegner des Esperanto behaupten, daß Esperanto niemals siegen wird. Dasselbe behaupteten die Rückschrittler von anderen wichtigen Erfindungen wie Eisenbahn, Flugzeug usw. Diese haben die Welt erobert. Auch die internatio-

Das ausgezeichnete Wörterbuch von Bennemann wieder zu haben! (Siehe letzte Seite.)

nale Hilfssprache wird die Welt erobern. Gegen die törichten Behauptungen der Rückschrittler sagen wir: „Und Esperanto wird dennoch siegen!“

S-ro Rollet de l'Isle, emerita prez. de Lingva Komitato kaj de Akademio respondis al koncerna artikolo en „Nia gazeto“.

Diskuto pri „ata-ita“ dramo! Ho! ne: nur komedio, ĉar ĝi montras la karakteron de la partoprenantoj: afablan, kolereman, naivan, tolereman, indiferentan ktp.

Permesu, ke mi donu al vi du konsilojn: 1. por trovi la ĝustan malsimplan formon de verbo, ne ĉiam elektu tiun aprobitan de la plimulto de la kompetentuloj; 2. citante frazon kiel pruvon, donu samtempe la kuntekston. Ekzemple ne trafas via argumento, ke ne estas ĝusta la formo „la pordo estas fermata“, kiam temas pri pordo, kiun oni fermis, ĉar oni ofte uzas la nuntempan formon por vigligi rakonton; sed tiam la kuntekstо tion montras: „Terure! hieraŭ mi alvenas, la pordo estas fermata.“

Alia ekzemplo de utileco de la kuntekstо: „En tiu ĉi ceremonio la pastroj estas nigre vestitaj“, ĉar temas pri difinita, speciala okazajo; sed „en tiu religio la pastroj estas nigre vestataj“, ĉar temas pri kutimo, ripetata ago. Same: „en tiu esprimo la akuzativo estas ĝuste uzita“ kaj „en ĉiuj similaj esprimoj la akuzativo estas ĝuste uzata.“

Sed trankviliĝu, viaj lernantoj estos komprenataj, ĉar ne ĉiam necesas ĝuste uzi la participojn — kiel en la franca lingvo — por esti komprenata. Tamen en kelkaj okazoj utilas atenti: se vi skribas al amiko: „kiam vi alvenos la pordo estos malfermita“ anstataŭ „malfermata“, li estos malagrable surprizita trovante je sia alveno la pordon fermita kaj foriros anstataŭ frapi la pordon, por ke vi malfermu ĝin.

DENOVE IOM PRI „ATA-ITA“

el „Nia Gazeto“ Nr. 7, Juli 1937.

Estas dramo! diras la aprila numero de „Nia Gazeto“. Kiom da inko defluis pro tiuj participoj!

Mi estas nek akademiano nek lingva komitatano, nur ... uzanto de la lingvo, kaj naive ŝajnis al mi, ke eraro pri la uzo de tiuj participoj estis neebla.

Malmodeste eĉ mi donis en aldono al „La Lumturo de Esperanto“ regulon simplan por francaj lernantoj (en „Lernu Esperanton“).

Ĉu mi eraris, ĉu sinjoroj Boucon, Corret, Era, ktp. kaj ĉu la uzantoj de Esperanto ĝis nun eraris, ĉu la prezidanto de la Akademio sole pravas?

Ŝajnas al mi, ke estas facile klarigi la regulon. Oni donu al ni, oficiale, kaj ni submetiĝos.

Ĉu la Akademio povas diri: „La pastroj estas nigre vestataj“, kiam temas pri pastroj, kiuj vestis nigre? Tiam, mi ne komprenis la regulon, kaj bedaŭrinde, buŝe kaj skribe, lernigis malbone al pluraj centoj da lernantoj el kiuj kelkaj estas nun profesoroj siavice.

Se mi eraris, mi devas diri ankaŭ: „La pordo estas fermata“, kiam mi parolas pri pordo, kiun oni fermis. Ni estu logikaj!

L. Kervran.

IEL-Junularo.

Centro: Wien, I., Neue Burg.

La dua grupo „IEL-Junularo, Grupo Linz“ ricevis ŝtatan permeson kaj ekfunkciis.

Por Federacia Lando **Salzburg** mi eknomas fakinstruiston Franz Föttinger.

Lando-gvidanto.

La gvidanto por Aŭstrio: Steiner.

Internacia Esperanto-Ligo
ĉefdel. G. Weber, Wien, I., Neue Burg.

La suplemento al la jarlibro aperos en oktobro.

Listo de la IEL-delegitoj en Aŭstrio!

Amstetten: J. Biberauer, orgen., Ybbsstr. 28.

Bisamberg: H. Steiner, kortega kons., Bundesstr. 154.

Bizau, Vorarlberg: Erna Fabjan, instruistino.

Blumau: H. Buchgraber, stenotip., Teasdorferstr. 4.

Bregenz: H. Stambader, ofic., Auf der Matte Nr. 4.

Ebelsberg: J. Neuhofer, fervoj-ĉefin., Ufer 24.

Ebensee: Fr. Weißkirchner, dent., Marktgasse 1.

Edelschrott: M. Kreutzer, maŝin, Nr.

Gmünd: H. Waldhauser, ofic., Walterstr. 171.
Groß-Siegharts: H. Nowotny, pord., Mühlgasse 60.
Innsbruck: R. Kühbacher, bak., Schulgasse 10.
Klagenfurt: O. Müller, urba ofic., Sankt-Veiter-Str. 21.
Köflach, Steiermark: W. Rogler, oficisto. Dr.-Dollfuß-Str. 250.
Korneuburg: H. Steiner, kort. kons., Bisamberg, Bundesstr. 154.
Krems a. d. D.: Fr. Stanke, komerc., Gartenaugasse 2.
Linz a. d. D.: J. Mraz, fakinstr., Aubergstr. 43/1; J. Kugler, poŝtinsp., Doktor-Holzknecht-Str. 7, vicdel.
Mauerkirchen: L. Koneberg, instr.-ino, Heiligengeiststr. 167.
Melk a. d. D.: K. Ehrenreich, hotelpos., „Bahnhof-Hotel".
Merkersdorf, P. Ernstbrunn: H. Huber, lernejestro.
Mödling: Dr. A. Casari, prof., Achsenaugasse 16.
Ried i. I.: J. Hellwagner, komerc., Lubergasse 5.
Riedau: F-ino F. Wilflingseder, Riedau 89.
Rodaun b. Wien: F. Braun, ŝtata ĉefadministr., Schubertgasse 1.
Salzburg: R. v. Lidl, ofic., Schwarzstr. 1; H. Hinterhuber, apotek., Linzerstr. 7, fakdel.
Schruns, Vorarlberg: H. Neyer, komerc. Nr. 40; G. Obexer, ofic.-ino, Außerlitzstr. 409, vicdel.
Sigmundsherberg: Dr. L. Scheuer, medicin-konsil.; E. Bauer, fervoja ofic., Nr. 46, vicdel.
Stammersdorf b. Wien: F. Zeitler, instr.-ino.
Steinakirchen a. Forst: H. Zant, instr., Nr. 27.
Steyr: H. Zeller, drog., Schlüsselhofgasse Nr. 25; E. Tillian, komercofic.-ino, Spitalskystr. 10, vicdel.
Straßwalchen b. Salzburg: Sepp Jesinger, komerc.
Taiskirchen i. Innkreis: F. Barth jun., helplabor., Fabrikstr. 53.
Unter-Tullnerbach: J. Schamanek, burĝlerneja eksdirekt.
Vöcklabruck: f-ino Brünne Fohler, Gmundnerstr. 43.
Vöcklamarkt: J. Brenneis, pensionano, Mõrasing 9.
Waidhofen a. d. Thaya: s-ino P. Pirchan, Hauptplatz 99.
Wien: M. R. Frey, studento, VIII., Alserstr. 63 a; R. M. Frey, kalkul-kons., vicprez. de AEA, III., Bechardg. 14; W. Mudrak, bankofic., III., Beatrixgasse 19/9, fakdel.; H. Kellner, ĉefkerneja direkt., XII., Aichholzg. 15; J. Reis, vend., VII., Kaiserstr. 92; L. Ruhsmayr, poŝtofic.-ino, IX., Postamt 70, Wilhelm-Exner-Str.; A. Schidloff, komerc., Kleine Mohreng. 4, fakdel.; E. Weber, artvitr., XVIII., Gentzgasse 27, fakdel.
Zell a. Pram: F. Aichhorn, ĝarden., ĉe Stöckl.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Reg.-Rat Fritz Stengel
Wien, XVII., Syringg. 3.

Nia movado kreskas! Post la ferioj komenciĝis la granda varbado ne nur de la estraro de AEA sed ankaŭ en la kadro de la diversaj grupoj. De la provincaj grupoj bedaŭrinde ankoraŭ mankas la raportoj pri la sukcesoj. La sukcesoj en Vieno estas por nia movado tre kontentigaj: du grupoj denove aliĝis al AEA. „Katolika Grupo" kaj „Fideleco" denove apartenas al AEA. Grupo „Gaswerk" — antaŭe en la kadro de „Nova vivo" — komencis labori ankaŭ por AEA kaj IEL. Dankon ne nur al la estraranoj de tiuj grupoj, sed ankaŭ al ĉiuj membroj pro la fido je AEA.

Krome okazos de AEA kelkaj **E.-kursoj** en Vieno. Jam anoncis sin partoprenantoj por 5 kursoj. Por la kursoj oni sin povas anonci **Merkrede** de 19—22 h en **Lehrerhaus,** 8. Josefsg. 12, 3. Stg., Parterre dekstre aŭ **sabate** 15—18 h 14. **Schweglerstr. 2,** eniro Felberstr.

Krome **kurso por komencantoj kaj progresintoj** (gvid. reg. kons. Stengel) XVII. Schumanng. 51 (Gasthaus Simacek, neniu konsumaddevigo) kaj **III.** (gvid. kalk. kons. R. M. Frey, Bechardg. 14).

Kursoj kun fervojistoj kaj poŝtistoj. Dank al la klopodoj de Esp.-Varbadservo por Aŭstrio la **Generaldirekcio de Fervojoj** kaj la **Generaldirekcio de Poŝtoj kaj Telegrafoj** kaj **ties direkcioj en la federaciaj landoj** publikigis reskripton, en kiu ili invitis al vizito de la E.-kursoj de AEA aŭ en okazo de malhelpo al partopreno en la skriba kurso de kort. kons. Steiner.

Foiro en Vieno. Dank al kort. kons. Steiner estis eble al ni, ricevi standon dum la aŭtuna foiro. La sukceso estis bonega. **Ni disdonis pli ol 10.000 propagandilojn, varbilojn kaj prospektojn, kiel ankaŭ pli ol 2000 slosilojn.**

Leterpapero, poŝtkartoj kun bildo kaj surpreso „Esp. rompas la murojn inter la popoloj" estas haveblaj: 10 leterpaperoj kun 10 kovertoj 1 ŝ; 40 poŝtkartoj 1 ŝ/Grupoj ricevas 10% rabaton.

Esperanto-Instituto. Dum la unuaj tagoj de novembro komencos E.-kurso por instruistoj kaj prepara kurso por la ŝtata ekzameno en Lehrerhaus. Anoncoj merkrede aŭ sabate ĉe la supre menciitaj adresoj.

E.-Renkontiĝo en Gmunden. Detalajn raportojn pri tiu ĉi grava renkontiĝo de la supraaŭstriaj grupoj sekvos.

Niaj grupoj en Wien kunvenas:

Marde: **„Fideleco"**, 18. Kreuzg. 2, Kafejo Michelbeuern 15—17 h 30.

„Esperanto-Klubo", I. Wallnerstr. 6 inter 18 h 30—21 h 30.

Merkrede: **„Gaswerk"**, 8. Josefstädterstr. 6 17—18 h.

„Katolika Unuiĝo Esp.", I. Stephanspl. 3 18—20 h.

Klagenfurt. En la kadro de „Aŭtunfesto" la grupo aranĝis belan E.-standon, kiu laŭ la sendita bildo multon kapablis efiki. Gratulon.

Melk: Kurso komenciĝos 15. okt. — Ni funebras pro la morto de s-ano **Karl Moser**, 28-jara. Korporacie la klubo ĉeestis la enterigon kaj metis girlandon kun Esp.-rubando su la tombon.

La klubestro: Ehrenreich.

Salzburg-a E.-grupo, gastejo „Schwarzes Rössel", eldonis bonenhavan flugfolion sub la devizo „Germane en la hejmlando — Esperanto en la alilandaro!". La folio finas jene: „Kiu lernas E-on, servas al si mem, servas al la fremdultrafiko, al sia popolo kaj patrolando kaj al la tuta homaro!"

E.-Klubo Wien de 5. oktobro kunvenas en sia hejmo 1. Wallnerstr. 6 (en la vestiblo la 1. pordo dekstre) ĉiun mardon de 18 h 30 ĝis 21 h 30. **Kurso:** dum 4 monatoj **ĉiun lundon** en la **sama ejo.** Komenco: **18. oktobro.**

Generalkunveno la **26. oktobro** 1937 je la 19 h.

Esperantokurso. Teknika Altlernejo Wien, Lektoro Univ. Prof. d-ro Sirk, Vintrosemestro 1937/38. Informojn donas Int. E.-Muzeo.

Esperanto-Kurs, geleitet von Lya Rußmayr; Vorbesprechung Freitag, den 22. Okt., 19 h 30, Restaurant Eier, IX., Porzellang. 4.

Viena-E.-Unio malfermos sian novan hejmon VIII., Bennoplatz 1 lunde, la 11. okt., je la 8-a vesp. Ĉiu esperantisto bonvena!

„Harmonio", oficiala organo de la E.-societo „Harmonio", Wien, redakcio: Alois Miksche, Wien, XII., Flurschützstr. 10/7, en julio novaperis, multobligita.

Ni gratulas al s-ano **Wilibald Rogler kaj edzino** okaze de ilia geedziĝo.

AE: Steiner.

Por Esperanto-kursoj

uzu la **lernolibron „Freude durch Esp."** (Ĝojo per E.) de kort. kons. Steiner. Havebla ĉe librovendejo Foltanek, Wien, I., Herreng. 2, aŭ pere de la verkinto, Wien, I., Neue Burg.

Esperanto-kurso per leteroj.

Skriba kurso en 20 semajn-leteroj komenciĝos la 15. oktobro. Prezo por la tuta kurso ŝ 2.50 en poŝtmarkoj.

Kort. kons. Steiner, Wien, I., Neue Burg.

Karaj legantoj!

Benvolu sendi ĉiujn korespondaĵojn koncerne AEA nur al prez. reg. kons. Stengel, por ke la aferoj ne estu prokrastitaj pro la ĉirkaŭvojo pri mia persono.

Steiner.

Werbet Abonnenten, Ihr ermäßigt für jedes Jahresabonnement Eueren Bezugspreis um 15%!

Wörterbuch BENNEMANN

Esperanto — Deutsch **und** Deutsch — Esperanto.

Beide Teile in **einem Bande** dauerhaft **gebunden, statt bisher S 20.40 nur S 12.60.**

(Auch in 4 Raten à S 3.40.)

Buchhandlung R. Foltanek, Wien, I., Herrengasse 2.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer", Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28.